FRANCA BATALA AVIADISTINO OFERIS SIAN VIVON

Okazintaĵo de tiu ĉi virino elpuŝis mian spiron. En la tempo de pereigado de multaj homvivoj ankoraŭ troviĝas tiuj, kiuj ĝian valoron konas kaj sin vicigas sur la duan lokon.

Caroline Aigle naskiĝis en la jaro 1974 kaj jam la 14-jara ŝi eniris armean lernejon. Kiel 25-jara ŝi fariĝis la unua batala aviadistino en historio de Francio. Ŝi aviadis pli ol 1600 horojn precipe aviadilon Mirage 2000-5. Ŝi estis ĉampionino en triatlono. En armeo ŝi atingis titolon de majoro. Ŝi apartenis inter seriozajn kandidatojn de Eŭropa Kosma Agentejo por enviciĝo inter estontajn kosmonaŭtojn.

Carolina havis kun sia edzo Christoph (ankaŭ batala aviadisto) filon Markon. Kiam ŝi atendis sian duan filon Gabriel, oni konstatis, ke ŝi malsanas pro tre danĝera formo de kancero. Sed Caroline rifuzis neprokrasteblan terapion, por ne endanĝerigi vivon de sia infano. Gabriel naskiĝis per akuŝtranĉo – antaŭtempe, sed senprobleme. Caroline dek kvin tagojn post akuŝo (21.8.2007) mortis en la aĝo de 32-jaroj.

Patro Pierre Demoures, kiu predikis dum ŝia entombigo, memorigis unu eksterordinaran okazaĵon.

Kiam Caroline kaj Christoph lin vizitis pro preparo de ilia geedziĝo, ili de li petis

iun libron – sed ne tian, kiu rakontus pri ilia reciproka amo, sed pri la amo, kiu nin malfermas rilate al aliuloj.

Caroline, la virino, kies brilantajn rideton kaj okulojn ni neniam forgesos, volonte oferis sian vivon en tiu la plej majesta batalo. ■

Sac. Pavel Martinka